

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 9

SEPTEMBRO, 1946

EPOKO LIBRO N-ro 8

LA VIRINETO EN BLUO

KAJ ALIAJ RAKONTOJ

originale verkitaj en Esperanto
de

MASON STUTTARD

Prezo : 3 ŝilingoj, afranko 3p.
(13 internaciaj respondkuponoj).

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.,

Anglujo

Mendu ĉe

via enlanda libroservo

aŭ ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.

Mi interŝanĝos 250 pecojn de Aŭstraliaj poŝtmarkoj (10 ekz. de 25 diversaj markoj) kontraŭ 250 pecoj de vialandaj poŝtmarkoj. Sendu viajn poŝtmarkojn per registrita letero. M. C. McKay, Kennedy Street, BOWEN, Queensland, Aŭstralio.

Antikvaĵoj el Egiptaj tomboj, faraonaj, greko-romanaj, Moslimanaj. Moneroj, manuskriptoj, pentraĵoj. Lunzer, P.O.B. 196, Alexandria, Egiptujo.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Jen io nekutima : La Gildo de Sankta Ajdan ne similas al iu alia organizaĵo, kaj eble ĝiaj celoj interesos vin. Nenia kotizo. Broŝureton senpage. Gildestro: Roye England (Del. IEL), Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Adresa ŝanĝo. Post la 12a de Aŭgusto 1946 la adreso de nia samideano T. J. Gueritte estos : 39 Lovelace Road, Surbiton, (Surrey), Anglujo.

Brita oficiro deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

La Nova Kristanismo, bazita je la doktrino de sveda scienculo kaj reformatoro Em. Swedenborg, enportas la certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas J. B. Vlach, Luzická 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondado dezirata en norvego aŭ dana lingvoj aŭ per poŝtkartoj en Esperanto. Iver Svarstad, P.O. Box 1909, Long Beach, Calif., Usono.

Sinjorina kanthoro LA NOVA MONDO ekzistos 15-9-46 unu jaron. Bonvolu sendi multajn gratulojn al S-ro Henk Valckenier, Daendelsstraat 64, Den Haag, Nederlando.

Mi deziras interŝanĝi kun tutmondo ĉiusepacajn papiliojn kaj koleopterojn. Paul Lesaffre, Sté Agglomérés, Don (Nord), Francujo.

Por angla lernejo geografia fakulo deziras interŝanĝi ĉiumonatajn veteraportojn kun lernejoj, veterstacioj, kaj observejoj tutmondaj. Detalojn oni petu ĉe S-ro G. Moir, Modern School, Whitburn, Co. Durham, Anglujo.

Kontraŭ 250 pm. uzitaj vialandaj sendos egalkvanton aŭstraliajn W. Illingworth, P.O.B.49, Bruce Rock (W.A.), Aŭstralio.

Mi deziras korespondi kun ano de la Internacia Federacio de Komerciaj kaj Profesiaj Virinoj. F-ino J. Fox, 55 South Park Drive, Ilford, Anglujo.

Deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn tutmonde. Nepré respondos. F-ino K. Dove, West Walls House, WAREHAM, Dorset, Anglujo.

Juna Esperantisto deziras interŝanĝi poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn kun eksterlandanoj. Eriberto Garcia, Bulnes 757, Buenos Aires, Argentino.

39-jara Esperantisto volas korespondi kun ĉiuj landoj. S-ro L. Johnson, 28 Standbridge Lane, Wakefield, Anglujo.

Ĉu ne plu ekzistas en la mondo bonhumoremuloj ? Mi deziras korespondi kun NEfilatelistoj, NEkolektantoj, NEpropagandistoj, NEpoŝtkartfinezuloj, preferi pri temoj ne seriozcelaj sed nur por ĝojig la legonton. Se tiuj ekzistas, mi ricevos iliajn leterojn kun kriegoj de ĝojo kaj tuj respondos. A. Kane, 1324 Raymond Avenue, Glendale 1, California, Usono.

Interŝanĝi poŝtmarkojn kun ekstereŭropaj filatelistoj deziras D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun eŭropaj filatelistoj Josef Pilar, Strakonice 158/I, Ĉeĥoslovakujo.

Tabeloj de tagoj negeneraj kaj generaj. Informo kontraŭ respondkupono. D-ro Havel Fr., ĉefdoktoro, Praha 55-Box 9, Ĉeĥoslovakujo.

Poŝtmarkinterŝanĝado tutmonde deziras M. Manteca, Puente del Arzobispo, (Toledo), Hispanujo, laŭ la jenaj kondiĉoj : (1) Nure ni interŝanĝos ordinarajn uzitajn poŝtmarkojn kurantajn kaj de nun aperontajn en niaj respektivaj landoj, pere de sola jara letero. (2) Ankaŭ povos la jarletero enteni ĝis 50 komunajn poŝtmarkojn ripetitajn kaj la ricevonto sendos samvalorajn pm. de sia lando. (3) Ankaŭ, se eble, ni plenumos reciproke sciigojn pri filatelaj aferoj.

Eŝua Bohor Koen, Gorna Ĝumaja, pl. Mite Markov 2, Bulgarujo, deziras reprezenti fremdlandajn komercajn kaj industriajn firmojn. Bankreferencoj bonegaj, eventuale bankgarantiaĵoj. Korespondas Esperante.

La "Fulmo" Ĉiamdaŭra Kalendaro estas ĉie en Esperantujo bonvena donaco, ne gravas kiam ajn. 1ŝ. 6p. afrankite : Inglis, 21 Lynmouth Road, Bristol 2, Anglujo.

Hungara Esperantisto ĉeĥoslovakdevena, iam beletristo kaj ĵurnalisto, petas ajnan helpon, ekz : ŝaklibrojn, por kiuj li povos interŝanĝe akiri nutraĵon per malsatanta familio. Nepré eventuale rekompencos—František Sima, Bartha János u. 1/A, Szentes, Hungarujo.



UNUECO

Kun la paso de la tempo pli kaj pli evidentiĝas, ke la deziro kaj la volo de la Esperantistaro estas al unueco en la movado. Leteroj el ĉiuj flankoj aldonas al nia propra konvinko, ke tio estas elstara bezono en la nuna tempo.

Dum jardekoj la Esperantistoj sin dividis je partioj kaj sekcioj laŭ fakinteresoj kaj tendencoj. Kondiĉe ke por la komunaj bonfarto kaj profito la diversaj asocioj kaj societoj scias kunlabori, tiu sindivido povas esti bona. Tio permesas pli grandan koncentrigon de la fortoj kaj ebligas pli kompetentan administradon de sekciaj kaj fakaj aferoj.

Tamen povas iafoje okazi, ke ekster la sole faka aŭ tendenca intereso, leviĝas demando aŭ problemo, kiu koncernas ĉiujn uzantojn de Esperanto. Por nomi nur unu tian ekzemplon, ni citu la Petskribon al UNO. Similaj aferoj povos sin prezenti en la estonteco kaj estas tre dezirinde, ke la Esperanto-movado frontu la cirkonstancojn unuece kaj solide. En la momento kiam la diversaj uzantoj de Esperanto scios ĝuste taksu la valoron de efektiva kunlaboro por la komuna bono, la tuta Esperanto-movado, inkluzive de la sekciaj, fakaj, kaj tendencaj partioj, ĝuos bonfarton kaj prosperon, kaj ni troviĝos tiom pli proksimaj de niaj respektivaj celoj.

I.E.L. ĉiam estis kaj ĉiam estos preta kunlabori por la profito de Esperanto. Tiuj, kiuj konas nian Ligon bone, ne surpriziĝos je tio, ke jam dum kelka tempo oni faris la necesajn antaŭprovojn kaj intertraktadojn kun U.E.A. en Genevo, kun la celo forigi la duecon, tiel bedaŭratan, en la neŭtrala Esperanto-movado. Tiuj intertraktadoj kulminis en vizito de I.E.L. Sekretario al Svislando por diskuti la aferon kun reprezentantoj de U.E.A., kaj ni havas la grandan plezuron fari la jenan anoncon :

I.E.L. kaj U.E.A.

Kunveno okazis en Bern la 21/22an de Julio 1946 inter reprezentantoj de I.E.L. kaj U.E.A. por interkonsenti pri kunfandiĝo de la du organizaĵoj kaj por ĉesigi la duecon en la Esperanto-movado.

Post du tagoj de tre amika diskuto oni trovis favoran bazon nun submetotan al la du komitatoj. La trovita interkonsento respondos al la celoj de la du partoj de la movado kaj certe ĝojigos la tutan Esperantistaron.


Partoprenis : C. C. Goldsmith, Hans Jakob, Hans Kürsteiner, G. Rotach.

Prezidis : Prof. Edmond Privat.

Ni esperu, do, ke 1947 estos por la Esperanto-movado la jaro de UNUECO, kaj la Kongreso en Bern la apoteozo, kiu kronos la laborojn de niaj gvidantoj.

M.S.

LA VENONTJARA KONGRESO



Estimataj Gesamideanoj,
Kiam je la fino de la 31-a Universala Kongreso de Esperanto, dum Aŭgusto 1939 en Berno, la Verda Flago malleviĝis, tiam sur la horizonto jam aperis la nuboj de minacanta milito. Sed neniu antaŭsentis la senkzemplan mizeron, kiu turmentos la mondon kaj fine surverŝos ĝin per maro da sango. De post tiu tempo multe da karaj salutoj atingis nin, kiuj pruvis al ni, ke la belaj tagoj en Berno ne estas forgesitaj.

Des pli kore ni ĝojas, ke la Internacia Esperanto Ligo decidis, ke la 32-a Universala Kongreso de Esperanto en 1947 denove okazu en Berno, la ĉefurbo de Svislando, kaj ke ni do havos la plezuron resaluti vin ĉiujn en la tagoj inter la 26-a de Julio kaj la 2-a de Aŭgusto

1947. Ni alte ŝatas la honoron, ke oni konfidis nin per la mandato, organizi ankaŭ la 32-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ni nepre serioze klopodos igi ĝin ne nur interesa kaj bela, sed ankaŭ sukcesega por nia movado kaj la kara mondlingvo.

Jam nun, karaj geamikoj, ni kore invitas vin, afable enskribigi vin por la 32-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno. Por nia lando, por nia bela urbo, kaj por ni mem estos granda honoro, akcepti vin solene kaj amike. Samtempe ni vin petas, stimuli ankaŭ viajn geamikojn al enlistigo. Ni intencas organizi, en la venonta jaro, manifestadon por nia Esperanto, kiu en estonta tempo al ĝi liberigos la vojon al la venko pli efike ol iam ajn ĝis nun.

Kiel eble plej baldaŭ vi ricevos la ceterajn informojn, la Kongresan Gazeton, la klarigojn pri loĝado kaj devo, pri la programo kaj la specialaj aranĝoj. Por ĉiuj informoj bonvolu turni vin al la subskribita komitato, kiu ĉiurilate estas je via dispono.

Kun samideanaj salutoj,

Loka Kongresa Komitato de la 32-a

Universala Kongreso de Esperanto en Berno, 1947.

Adreso : Bundsgasse 20.

(Aliĝilo troviĝas sur paĝo 4 de la kovrilo).

106,314

La nunan ciferon pri nia kampanjo ni povas rigardi kiel specon de etapo sur la espreble longa vojo de nia irado. La unua centmilo! Kiom el niaj kunlaborantoj kuraĝis esperi en la komenco, ke ni atingos tiun ciferon? Kaj tiel frue en la kampanjo? Ni povas nur re-emfazi, ke kiam alestas la volo, ĉio ajn estas atingebla. Ni ne dubas nun, ke ni atingos milionon, povos esti eĉ pli. Parenteze tio estu por ni valora leciono, ke ni ja povos atingi nian celon per kunlaboro kaj fervora agemo.

En tiu lasta rilato, ni ne povas preterlasi aludon pri artikolo, kiu aperis en la Junia numero de *Esperantobladet* sub titolo *La Spirito de Kunlaboro*. En tiu artikolo la aŭtoro faras pledon por harmonio, sed ŝajnas al ni, ke li efektive sukcesas nur disjeti la semojn de plua konflikto per tio, ke li presigas imagan konversacion inter la Sekretario de IEL kaj la Sekretario de FLE en Nederlando. Kvankam la aŭtoro diras, ke tiu interparolo estas nur imaga, ni opinias, ke tio estas justa nek al unu nek al la alia, ĉar estas tre eble, ke multaj samideanoj ja kredos, ke tio aŭ io simila efektive okazis.

Rilate nin, ni senrezerve kaj emfaze refutas la aserton, aŭ eĉ la sugestion, ke IEL volis trudi sian volon al kiu ajn, kaj se IEL insistis pri tio, ke la nomo de la organizato staru en la supro de la deklarfolioj, tio neniel estis pro ia ajn prestiĝo aŭ fiero niaflanke—kiel erare supozis la aŭtoro de la artikolo—sed cedo nur al la postuloj de neceseco kaj bona organizado. S-ro Goldsmith prave atentigis al ĉiuj kunlaborantaj organizaĵoj, ke se la nomoj de la diversaj kunlaborantoj troviĝus supre de la respektivaj folioj, tio povus sekvigii la kredon ĉe multaj homoj, ke ekzistas pluraj petskriboj al UNO, kaj kompreneble oni certe volus subskribi ĉiujn. En la okazo, ke tio malkovriĝus al UNO, la valideco de la tuta Petskribo estus nenigata, ĉar oni ne havus garantion, ke neniu subskribis pli ol unu folion. Jen la sola klarigo de nia insistado, ke la nomo de IEL troviĝu supre de ĉiu folio, kaj la nomo de la koncerna kunlabora organizaĵo tuj sube en klaraj literoj.

Ĉiuj organizaĵoj konsentis pri la saĝeco de tiu propono, kun la escepto de la gvidantoj de FLE kiu, laŭ deklaro en iu kunsido, "... ne volas humiliĝi antaŭ lia postulo ..."

Ni estas certaj, ke ne nur ni, sed ĉiuj niaj kunlaborantoj, bedaŭras la nepartoprenadon en nia kampanjo de iuj oficialaj

laboristtendencaj instancoj. Tute kompreneble, ĉiuj volus, ke la Petskribo estu prezentata en la nomo de la tuta Esperantistaro kaj ni ripetas, ke la oficiala transdono ja okazos en la nomoj de la koncernaj instancoj. Ni tial tre esperas, ke eĉ nun la nekunlaboraj organizaĵoj (estas nur du) rekonsideros sian decidon.

Jen la ciferoj ĝis 6a de Aŭgusto.

Landoj

Aŭstralio ..	1530	Kanado ..	175
Aŭstrujo ..	46	Luksemburgo ..	31
Belgujo ..	2190	Maroko ..	947
Brazilo ..	2036	Nederlando ..	13149
Britujo ..	12608	Norvegujo ..	8773
Bulgarujo ..	18064	Nov-Zelando ..	1657
Ĉeĥoslovakujo ..	6175	Palestino ..	387
Danujo ..	3777	Polujo ..	10
Egiptujo ..	1242	Portugalujo ..	3014
Finnujo ..	4727	Sovet-Unio ..	1
Francujo ..	2982	Sud-Afriko ..	60
Germanujo ..	369	Svedujo ..	11859
Grekujo ..	473	Svisujo ..	910
Hindujo ..	47	Usono ..	2611
Hungarujo ..	1810	Ceteraj landoj	32
Islando ..	3775		
Italujo ..	847	sumo	106314

Okupoj

Artistoj ..	664	Navigaciistoj	438
Delegitoj		Parlamentanoj	28
Komunumaj	142	Policistoj ..	621
Dentistoj ..	119	Presistoj ..	1047
Desegnistoj ..	584	P.T.T.-istoj ..	2190
Dommastrinoj	15707	Religiistoj ..	363
Edukaj		Sciencistoj ..	444
Aŭtoritatuloj	342	Sindikataĉefoj	154
Elektristoj ..	808	Soldatoj ..	1390
Farmaciistoj	314	Studentoj ..	8747
Farmistoj ..	4273	Ŝoforoj ..	803
Hotelistoj ..	456	Ŝtatoficistoj ..	2403
Inĝenieroj ..	4086	Teknistoj ..	580
Instruistoj ..	6132	Transportistoj	5524
Juristoj ..	524	Urboficistoj ..	909
Jurnalistoj ..	388	Vendistoj ..	2988
Komercestoj ..	18492	Vestistoj ..	1473
Konstruistoj	2124	Diversaj ..	5648
Kuracistoj ..	1494		
Laboristoj ..	7264	sumo	106314
Lingvistoj ..	93		
Metiistoj		Ĝis 24 Aŭg.	119000
Diversaj ..	6558		

Bonvolu noti, ke kelkajn landojn, kie la cifero verŝajne ne konsiderinde kreskos, ni nun kune klasifikas sub *Ceteraj landaj*.

PENSOJ PRI LA DEKLAROJ

En la Junia numero de *E.I.* mi legis, ke Usona samideano fiksas sian privatan kvoton je unu mil. Mi supozas, ke la Usona samideano intencis starigi per ĉi tiu cifero rekordon, ĉar rekordoj estas tre popularaj en Usono. Mi do formatis la gazeton kaj eknombri la subskribitajn foliojn, kiujn mi ĝis nun kolektis; kaj la rezulto? 1,124 folioj el 97 lokoj. La rekordo estas do rompita antaŭ ol ĝi estis farita.

Sed ĉar mi ne volas esti eterna tenanto de ĉi tiu rekordo, mi sciigos al la Esperantistaj rekordemuloj kiel mi kolektis la subskribojn. La recepto estas tute simpla: mi klarigis la aferon en la lernejo al niaj studentoj—komerca akademio—kaj poste mi disdonis al ili la deklarojn. Ĉiuj subskribis. Sed tio ne sufiĉis al mi. "Vi ja havas patron kaj patrinojn, gefratojn kaj bogefratojn, geavojn kaj geonklojn, gekuzojn kaj geamikojn . . . kaj ili ĉiuj certe volonte subskribos, se vi klarigos la aferon al ili. Kiom da deklarfolioj vi do bezonas?" Ridetante ili nombris siajn karulojn kaj dum la sekvantaj tagoj mi rikoltis dekojn, ja centojn da subskribitaj deklaroj. Simile povas procedi ĉiu instruisto, eĉ en la popolernejo. Ju pli malgranda la propagandisto, des pli energia kaj sukcesa.

Krome mi klarigis la aferon en nia loka gazeto kaj poste mi vizitis niajn grandajn firmojn, magazenojn, laborejojn de metistoj, kie mi havis konatojn. Ĉar preskaŭ ĉiuj estis legintaj mian artikolon, necesis nur disdoni la deklarojn kaj post kvin minutoj ilin denove kolekti. Jen mia recepto. Mi firme kredas, ke mia Usona samideano—kaj ne nur li—baldaŭ rompos mian neintencitan rekordon. Sed bone atentu, ne sufiĉos gajni la vetkuradon je *ĉevala nazlongo*, ĉar mi ankoraŭ ne finis mian kolektaĵon.

Eminentulojn, kompreneble, mi vizitis persone. Tiamaniere mi ricevis la subskribojn de nia distrikteĉfo, de lernejaj inspektoroj kaj direktoroj, universitataj profesoroj kaj redaktoroj, ĉefkuracistoj de niaj malsanulejoj, de kvar parlamentaj deputitoj apartenantaj ĉiu al malsama politika partio, de majoro en partizanaro batalinta kontraŭ la Germanoj kaj ordenita per *Batakruc*o 1939, de . . .

Iliaj subskriboj valoras dekoble. Unue kreskas la nombro de la subskriboj kaj due neniam plu ili povos paroli aŭ skribi kontraŭ Esperanto, ĉar per sia subskribo ili rekonis la necesecon de internacia lingvo kaj la taŭgecon de Esperanto por tiu ĉi tasko. Ni ne forgesu, ke ĝuste ili estas la

kreantoj kaj portantoj de la publika opinio! Kompreneble, la subskribo de deputito aŭ ĉefkuracisto ne estas havebla post kvinminuta babilado. Se mi ne konas la eminentulon persone, mi serĉas inter mia konataro tiel longe, ĝis mi trovas konaton, kiu estas ankaŭ konato de la eminentulo kaj tiu ĉi komuna konato devas alporti al mi la deziran subskribon.

Ĝis nun rifuzis al mi la subskribon nur ege malmultaj personoj. Du profesoroj de angla lingvo, kiuj deziris, ke la angla fariĝu lingvo internacia. Sed rifuzis ankaŭ kelkaj katolikaj pastroj, kaj senefikaj restis mia atentigo, ke antaŭ la milito ekzistis Tutmonda Katolika Asocio eldonanta la gazeton *Katolika Mondo*, kies agado eĉ tenis la papo. Vane. Ili opinias, ke lingvo internacia fariĝos la . . . latina! Tamen kelkaj aliaj rom-katolikaj pastroj volonte subskribis.

Temperamenta ĉefo de granda eksporta firmo interrompis mian enkondukan paroladon per la jenaj vortoj: "Unu lingvo por la tuta mondo, lingvo kiu estas krome tre facila, kiel vi diras, tio estas ja idealo de ĉiu homo, kiu estas ĉiutage devigata intertrilati kun la plej diversaj ŝtatoj kaj popoloj. Diru, sinjoro, kial vi Esperantistoj jam de longe ne klopodis pri enkonduko de Esperanto en la komercon, en la lernejon, en la sporton, en la turismon, en la . . . Ne, sinjoro, tio estas nepardonebla . . ."!! Jam 29 jarojn mi laboris por Esperanto per ĉiuj rimedoj: per vorto, per artikoloj en gazetoj, per libroj, ja eĉ per radio, je ĉiu argumento kontraŭ Esperanto mi havas pretan kontraŭargumenton, sed kontraŭ tiu ĉi akuzo mi estis sendefenda. Aŭdante ĝin, mi tute mutiĝis kaj forgesis eĉ fermi la buŝon. Nu samideanoj, ni do klopodu plenumi lian postulon kiel eble plej baldaŭ, alie venos tempo, kiam la mondo nin akuzos pro nesufiĉe energia kaj persista propagando . . . Kiu do kolektos 2000 ?

La redakcio de *E.I.* fieras en la 5a numero pri duonmiliono da presitaj folioj en 20 landoj. Kion signifas duonmiliono por UNO? Milfoje pli facile vi sukcesos ricevi la subskribon de ne-esperantisto ol altiri lin en Esperantan kurson. Ĝis nun ni konvinkadis la mondon per raciaj argumentoj. Vane. Nun ni provu ĝin per la kvanto. Jen: 800 deklarfolioj pezas 1 kilogramon, 10 milionoj pezas 125 q, tio estas tuta vagono da subskriboj! Kredu, nur tia argumento konvinkos la mondon, kontraŭ tia atoma bombo devos kapitulacii eĉ UNO. Jes ja, al tiu ĉi celo ni koncentrigu nian tutan energion kaj sagacon.

Th. Kilian, Ĉeĥoslovakujo

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

AŬSTRUJO

La aŭstra ministerio por instruado konsentis pri la enkonduko de Esperanto en la lernejon. La rektoro de la altlernejo por monda komerco, Prof. Franz Dörfel, akceptis la honoran prezidantecon de la Aŭstra Societo Esperantista. La administracio de Radio Wien promesis dissendi Esperanton post perfektigo de la dua radiosendilo. V.K.

ĈEĤOSLOVAKUJO

La Centra Laborista Lernejo de Socialista Partio aranĝis konversacian Esperanto-kurson 12an ĝis 25a de Aŭgusto, 1946 en sia somerdomo *Vesely klášter* en Bojanovice. Informoj ĉe: Ustředni škola dělnická, Praha II, Jindřišská 5, Ĉeĥoslovakujo.

La vigla Esperanto-Societo en Olomouc aranĝis 10an de Junio feston, kiu havas intereson por la Esperantistaro. Okazis en urba parko malkovro de la denove starigita Esperanto-memorŝtono, kiu estis kaŝata dum la nazi-reĝimo. La Esperanto-arbo, *liliodendron tulipifera*, alportita el Ameriko ankaŭ travivis la militon. Inter multaj aliaj ankaŭ ĉestis S-roj Adolf Malík kaj Antonín Slanina, konataj en la Radio Praha, kaj S-ro Zdeněk Raška de Radio Moravska Ostrava. S-ro Albin Neužil deklamis sian poemon *Memorŝtono*.

SVEDUJO

Dum la Pentekostaj festotagoj la Sveda Esperanto-Federacio okazigis sian Jubilean Kongreson kaj Jarkunvenon en Uddevalla.

Sabate okazis oficiala akcepto de urba reprezentanto kaj en la vespero akcepta festeno kreis la taŭgan atmosferon por tiu brile sukcesa kongreso. Pri la organizado respondecis S-ro Einar Dahl kaj fervora aro da lokaj gesamideanoj. Elekto de la rava kaj oportune lokita Bohusgarden multe kontribuis al la feliĉa restado en Esperantujo.


Ĉeesto de pluraj alilandaj samideanoj donis vere internacian karakteron al la kunsidoj.

En la inaŭgura kunsido oni elektis S-ron Jan Strönnne prezidanto de la Jarkunveno. En tiu kunveno, kiu okupis la tutan pentekostan tagon, oni faris gravajn decidojn pri estonta agado kaj precipe pri junulorganizado kaj faksekcioj en SEF. S-ro Wästfelt, Ĉefdelegito de IEL, faris raporton pri la pasintjara agado.

Laŭ raporto en *Svenska Esperanto-Tidningen*

URUGVAJO

Estas starigita nova grupo en ĉi tiu lando, *Las Piedras Esperantista Societo*, la unua post tiu en Montevideo.





POLUJO

Lodz, strato de Zamenhof. Dua Tago de la 10a Pola Kongreso (raportita en Aŭgusta numero). La tabulo estis enmurigita en 1930. En 1939 ĝi estis desirata de la Germanoj kaj uzata en iu korto kiel trotuarplato. Feliĉe ĝi konserviĝis kaj estis denove enmurigita en 14-4-1946 danke al la klopodoj de la loka grupo kaj la urba estraro en Lodz.

B.M.

Blinduloj

La unuan postmilitan numeron de *Esperanta Ligilo* dissendis ĝia redaktoro kaj presisto, S-ro Harald Thilander (Stocksund, Svedujo) dum Julio. Krom redaktora noto, ĝi enhavas raporton de S-ro R. Israëls pri dumilitaj blindulaj aferoj en Nederlando, mallongajn artikolojn el *Esperanto Internacia*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Svenska Esperanto-tidningen*.

Ĝi ja interesos ĉiujn legantojn, sed la ĝojo, kiun ĝi alportas al la plej militvunditaj landoj, kies brajlpresoj kaj bibliotekoj detruigis, estas vere nekalkulebla. Multaj tiulandaj blinduloj, senigite je legaĵo en la nacia lingvo dum jaroj, kiel ekzemple Kapitano Jan Silhan en Polujo, suferas de granda *brajl-malsato*. Preskaŭ ĉie, kie nun funkcias la poŝtservo, blinduloj korespondas denove per Esperanto.

W. P. Merrick, Anglujo

Skoltoj

Lordino Baden-Powell, Ĉefskoltino de la mondo, ripetis la aprobon pri Esperanto, kiun ŝi kaj Lordo Baden-Powell jam ofte esprimis dum la jaroj de ilia gvidado de la Skolta movado. En letero al D-rino Lydia Allen DeVilbiss en Miami, Florida, Usono, Lordino Baden-Powell skribis jene: . . . "Mi tre ŝatas vian penson sendi al mi informon pri via Esperanto-societo. Kompreneble mi tre ofte kontaktis ĝin kaj estus bonege se S-ino Roosevelt povus persvadi UNO-n enkonduki ĝin tra la tuta mondo, kaj akceptigi ĝin en ĉiuj lernejoj kaj komunumoj".

trad. el *American Esperantist*

La asocio de Ĉeĥoslovakaj skoltoj—*Junák*—starigis fakon de Esperanto por internaciaj rilatoj. Estroj de tiu fako estas Fr. Buhr kaj St. Lešinger, kiuj delonge propagandas Esperanton ĉe skoltoj, kaj kiuj estas komitatanoj de EAĈSR. Oni admonas al alilandanoj simile agi je provoj fondi Esperanto-fakon ĉe landaj skoltasocioj.

Oni petas internaciajn kontaktojn pere de Junák, asocio de Ĉeĥoslovakaj Skoltoj, Esperanto-fako, Praha II, Štěpánská 61, Ĉeĥoslovakujo, kaj precipe kun tiuj, kiuj partoprenos la venontan jamboreon.

RECENZOJ

* = akireblaj ĉe I.E.L.



***La Libro de la Spiritoj**: el Franca orig. de A. Kardec trad. L. C. Porto Carreiro Neto, L.K.K. Eld. Livraria Editora

de Federacao E. Brasileira. Prez. bindita 12s. 9p., broŝ. 10s. 6p., 531 p. 19x14 cm. Afranko 9p.

Allan Kardec estis sciencisto, kiu interesiĝis pri la kuriozaj kaj ŝajne neklarigeblaj fenomenoj, kiuj multloke sin manifestis kaj ofte terurigas la homojn, kiuj nomis ilin supernaturaj. Al tiu esploro li dediĉis sian analizemon kaj sian kompetenton, kaj ĉi tiu verko estas la rezulto. Ĝi estis la unua vere grava verko pri la temo kaj servis sisteme kiel unuiga faktoro kaj deirpunkto por la posta elvolviĝo de la movado, kiu akceptis ĝin kiel gravan inspiritan verkon. Por milionoj da homoj en ĉiuj mondpartoj ĉi tiu verko ankoraŭ estas akceptata, flanke de la Biblio, kiel morala apogo kaj fonto de inspiro. En tiu rilato ĝi rajtas rekonon kiel grava religia verko kaj ni povas saluti ĝian aperon en Esperanto.

Angla amiko mia, kiu loĝis kelkan tempon en monaĥejo en Tibeto por tie ricevi instruon pri la Budhisma doktrino, miris pri la intereso, kaj—kelkrilate—admiro, kiujn la monaĥoj montris pri la Kristanismo kaj oni admonis lin, ke inter religioj ne povas esti konkuro, ĉar ĉiuj vojoj kondukas al la Vero. Mi memoris tion legante ĉi tiun verkon, ĉar en ĝi troviĝas iom de tiu grandanimeco, de tiu toleremo kaj kompreno pri la vasta horizonto de la homa vivo. La aŭtoro ne predikas dogmojn nek ritojn, sed prezentas en formo de dialogo — demandoj kaj respondoj—inter si kaj, laŭ pretendo, estuloj en la spirita mondo, sufiĉe klaran superrigardon super la tutan kampon de la homaj rilatoj kun komentario pri la etikaj valoroj de tiuj rilatoj.

Sekve de miaj antaŭaj recenzoj pri spiritismaj libroj, iu korespondanto, erare kredante ke mi estas spiritisto, skribis por averti min pri tiu "verko de la diablo". Precipe post tralego de ĉi tiu verko, mi devos ŝanĝi mian opinion pri lia Satana Moŝto. Li nepre devas esti stultulo, ĉar obeante la saĝajn admonojn kaj sekvante la alte moralajn principojn de *Libro de la Spiritoj*, oni tute certe ne trafus en la diablan reton!

La demandoj kaj respondoj faras tre stimulan debaton kaj iuj eble miros, ke verko pri spiritismo dediĉas tiom da spaco

al aferoj materiaj, teraj, precipe el la fakoj fizika kaj biologia. Interese estas legi, ekzemple, ke en 1857 (la dato de la unua eldono) medio en tranco povis respondi, ke la materio konsistas ne el pluraj elementoj, sed "El unu sola primitiva elemento", kaj ke la diversaj propecoj de la materio "... estas modifoj kiujn la molekuloj ricevas ĉe sia kuniĝo kaj en difinitaj kondiĉoj." Ankaŭ: "... nenio estas malplena: kion vi kredas malplenaĵo, tio estas okupita de materio, kiun ne atingas viaj sentumoj kaj viaj aparatoj."! Kiom da fojoj en la lastaj jardekoj ni aŭdis niajn fizikistojn diri similan!

Kiel okazis ĉe aliaj religioj kaj doktrinoj, simile ĉe la spiritismo; kun la tempo okazis devojiĝoj kaj skismetoj, kaj la studento rimarkos, ke la doktrino de Kardec estas pli parenca al tiu de Teozofio ol multaj sektoj de spiritistoj nuntempe akceptas. Precipe tio estas vera pri la Brita skolo, kiu ne akceptas la doktrinon pri ripetataj enkorpiĝoj por la perfektigado de la animo, sed kredas, ke la animo atingas perfektecon per plenumo de diversaj laboroj en la spirita mondo mem.

Tamen la verko traktas detale pri la senmorteco de la animo, la naturo de la spiritoj, la naturaj leĝoj, la nuntempa vivo kaj la estonta, kaj la estonteco de la homaro, do, iom vasta tereno!

La rimarkigoj, kiujn mi faris en antaŭa recenzo pri la aparte eldonita *Enkonduko* ankaŭ ĉi tie validas. Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva, ĉi tiu verko estas la plej kontentiga verko, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto. La stilo estas simpla kaj klare komprenebla, kaj la frazoj portas la stampon de instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon. Mi ne dubas, ke la tradukado postulis kompetenton preter la ordinara, kaj rigoran kontroladon por tiel brile sukcesi. La rezulto estas libro, pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta, ĝia valoro estas netaksebla. La preso kaj papero estas bonaj kaj la tuto faras belan imponan volumon.

Mason Stuttgartard

MI SERĈIS ORON KAJ OLEON SED TROVIS . . .

El sveda orig. de DAVID FLOOD.
Tradukis K. GUSTAFSSON.

Bind 9s. afranko 5p.

Mendu ĉe I.E.L.

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	19.00–19.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 25.34m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanta Programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je 16a de septembro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	17.50	Sofia (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radiostacio, Moravska Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	16.30–16.40	Hradec Králové-Pardubice (Ĉeĥoslovakujo). 280m. Esperanto-programo. Vychodočeský vysílač (Orientbohema radiostacio), Hradec Králové.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	18.05	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	17.50	Sofia. (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	20.50–21.00	Moravska Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
Sabato	18.30–18.45(?)	SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00–19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Brita somera tempo oni aldonu unu horon, kaj por Mez-Eŭropa somera tempo du horojn, sed notu ke pro la enkonduko aŭ ne-enkonduko de somera tempo en diversaj landoj ni ne povas esti certaj pri la ĝusteco de ĉi tiu rimarko. Ni urĝe petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevado.

Dana Radio—Post longa penado la Centra Dana Esperantista Ligo sukcesis persvadi la danan radion akcepti disaŭdigon en Esperanto, kiu okazis la 22an de aŭgusto. Bedaŭrinde la informo alvenis tro malfrue por anonco en nia aŭgusta numero. C.D.E.L. insiste petas samideanojn ĉie skribi al la Statsradiofonien, København, ĉar estis pro la manko de eksterlandaj raportoj pri aŭdebleco de la stacioj Kopenhago (255.1m.) kaj Kalundborg (1250m. kaj 31.51m.) ke la dana radio eksperimente disaŭdigis prelegon en Esperanto. Eĉ se vi ne aŭskultis, skribu al la stacio dankante pro la dissendo; donante informon, se eble, pri la kutima aŭdebleco de la danaj stacioj, kaj petante estontajn programojn en Esperanto.

LA PROPAGANDO DE ESPERANTO

Kiam Doktoro Zamenhof estis farinta sian projekton li ne opiniis sian taskon finita. Li nur forĝis la aparaton, per kiu li esperis efektiviĝi sian celon, la interfratigon de la diversaj popoloj. De tiam la devizo estas *propagando*.

Tiuj, kiuj sin okupas per tio, jam spertis kion peza kaj kelkfoje senesperiga tiu tasko estas. Tiu tasko ne estas senesperiga, se la novaj adeptoj restus adeptoj. La progresado estus malrapida kaj malfacila, sed la disvastiĝo estus konstanta kaj laŭpene kontentiga. La sperto tamen instruis, ke ne ĉiu adepto restas adepto. Preskaŭ ĉie la statistiko montras, ke la plimultiĝo pro la novaj membroj estas nuligata pro la perdo de la eksigintaj membroj. Ni havas kernon de membroj, sed ĝi ne konsiderinde kreskas. Kvankam la eksigintaj membroj ne fariĝas kontraŭuloj de Esperanto, ili tamen apartenas al la grupo de neinteresigintoj. Ili ne propagandas, ne restas informita pri la stato de nia movado, ne plu studas aŭ uzas la lingvon, ne plu kontribuas finance, do ne plu havas praktikan valoron.

Kutime la homoj opinias, ke la Itala lingvo estas pli belsona ol la Angla lingvo, tamen troviĝas multe pli da kursoj pri la Angla lingvo ol pri Itala. Ankaŭ en ĉi tiu okazo regas la ideo: la Angla lingvo estas multe pli disvastigita; ĝi estas multe pli utila al mi; mi bezonas ĝin; do mi lernas la Anglan lingvon. Nia devizo do estu: KREU LA BEZONON.

Ĉi tiu *kreu la bezonon*—ideo ne subite naskiĝis ĉe mi. Ĝi estas la rezultato de kelkjara senfrukta laboro, kiam mi kiel propagandisto por Esperanto laŭ pure ideala maniero esperis rikolti sukceson. Tiu metodo tute fiaskis kaj iun tagon mi tute ŝanĝis mian laborplanon. Tion kaŭzis kvinminuta konversacio kun granda industriisto. Per speciala rekomendo mi estis akceptita de ĉi tiu potenculo. Klariginte la celon de mia vizito, mi ricevis la kvietan kaj ĝentilan respondon, kiu ne estis miskomprenbla. "Mi tre dankas vin pro tio, kion vi ĵus rakontis al mi. Se vi deziras paroli kun mi pri idealoj, mi volonte akceptos vin en mia hejmo. Ĉi tie estas mia oficejo, kie mi povas paroli nur pri praktikaj aferoj." La konversacio estis finiĝinta. Tio estis granda bato por mi, ĉar mi estis atendinta gravan sukceson. Mi tamen sentis la grandan valoron kaj veron de ĉi tiu ne petita konsilo.

Mi do demandis al mi, kiel mi povas sentigi la necescon de Esperanto al la ne-esperantistaro? Mi faris kvazaŭ mi enirus mian propran landon kiel fremdulo.

Efektive mi komencis labori por la estonta eksterlanda Esperantisto, sed se la metodo montriĝis efika, la bazo por la universala Esperanto-propaganda metodo estus konstruita.

La plimulto de la homoj ankoraŭ kutime vojaĝas vagonare. Mi do alvenis en la Centra Stacidomo en Amsterdam kiel fremdulo. Jen mi staris sentante min forlasita. En la halo ja troviĝis informejo, sed tie oni parolis nur Nederlandan, Francan, Germanan kaj Anglan lingvojn; eble unu aŭ du pli, sed plaĉis al mi aparteni al unu el la tre multaj aliaj popoloj, kiuj estas traktataj en tiaj momentoj kiel orfoj. Kiom agrabla surprizo estus, se nun aperus samlandano, kiu konas la vojon en Amsterdam kaj kiun mi povus tute fidi. Kiom agrable estus por Esperantisto esti akceptata de sia I.E.L.-delegito. Mi tamen ne rajtas postuli, ke la delegito ĉiam staru ĉe la elirejo por akcepti eventuale alvenantajn Esperantistojn. Oni povas eviti ĉi tiun malfacilaĵon. Oni povus pendigi ŝildon surhavantan la nomon kaj adreson kaj eventuale la telefon-numeron de la delegito. Tiam oni scius al kiu sin turni. Unue do mi devis zorgi pri tia ŝildo. Interparolo kun direktiano de la Nederlandaj fervojoj donis rezulton. En ĉiu urbo, kie loĝas I.E.L.-delegito, pendas ŝildo kun verda stelo kaj adreso de la tiea delegito.

Poste mi imagis, ke mi bezonas la helpon de la delegito. Kio estus pli simpla ol telefoni lin? La problemo estis nur: kiel funkciigi la aŭtomatan aparaton? La priskribo ja staras en por mi nekomprenebla lingvo! Ankaŭ ĉi tie la teksto estu en Esperanto. Vizito ĉe la direkcio de la telefon servo ne tuj efikis. Teknikaj kaŭzoj malhelpis tion. Post duona jaro mi tamen ricevis sciigon, ke la malhelpo ne plu ekzistas kaj ke mia peto povos esti plenumata. En ĉiuj publikaj telefonbudoj nun staras la komuniko en Esperanto, kiel funkciigi la mekanismon. Ne nur en Amsterdam, sed en la tuta lando.

Tiam mi devis lui ĉambron en hotelo. Solvon rilate la konversacion kun hotelisto mi ne povis trovi. Tiurilate mi estis dependa de mia gastiganto. Pordistoj kaj kelneroj ankoraŭ apartenas al la indiferentuloj. La nura solvo, kiun mi trovis, estis la *regularo de la domo*. En preskaŭ ĉiuj hoteloj troviĝas sur la muro komunikaro por la gastoj, ekz.:

Sonorigu 1 x por la ĉambristino.

„ 2 x por la kelnero.

Ĉe foriro forlasu vian ĉambron antaŭ la 12a, h.t.p.

Kutime tiuj komunikoj estas menciitaj en la tri tiel nomitaj modernaj lingvoj. Laŭ mia peto diversaj hotelistoj jam komunikis ĉion ankaŭ en Esperanto.

Daŭrigante mian fantazi-vojaĝon, mi iris surstrate por serĉi restoracion. Vere tiam komenciĝis la malfacilaĵoj. Kion signifas por fremdulo *halve houtsnip, volmops, kwast, hutspot, huzarensalade, klapstuk, flensje*, k.t.p.? Ankaŭ ĉi tie la kelneroj parolis neniu Esperanto-vorton. Mi trovis solvon en dulingva menuo. Ankaŭ sur tiu tereno, mi trovis multan helpon ĉe la restoraciistoj. En pli ol 80 ordinaraj restoracioj kaj 7 mangosalonoj en la stacidomo tia menuo estas havebla. Krom la manĝoj, la menuo ankaŭ mencias la tradukon *por forko, kulero, kion kostas tiu ?, kioma horo estas ?, mi devas rapidi*, k.t.p.

Post mia lunĉo mi mendis taksiaŭtomobilon. La tarifo enhavas la trinkmonon. Ankaŭ ĉi tie tio devis esti menciita en Esperanto, kion la direkcio de la taksiaŭtomobil-kompanio aprobis.

Preterirante la poŝtofcejon mi haltis momenton por informiĝi, ĉu leteroj estis alvenintaj por mi, kaj kion mi vidis? Apud la ĝiĉeto pendas metala ŝildeto kun surskribo *Oni parolas Esperanton*, kiun ŝildeton la direkcio disponigis al Esperantista poŝtisto.

Por ke mi mem povu orientiĝi, mi vizitis la oficejon de la fremdultrafiko *Amsterdam*, Rokin 5, kie mi ricevis planon de la urbo kun teksto en Esperanto.

Kara leganto. Mia vojaĝo estis fantazio, sed fakto estas, ke

- (1) la I.E.L.-ŝildeto pendas ĉe elirejoj de la stacidomoj,
- (2) telefonbudoj havas la klarigon por la publiko en Esperanto,
- (3) hotelĉambroj mencias la komunikon por la gastoj en Esperanto,
- (4) la restoracioj havas la menuojn en du lingvoj,
- (5) la taksiaŭtomobiloj havas la tarifon en Esperanto,
- (6) la direkcio de la poŝta servo disponigas ŝildojn *Oni parolas Esperanton*,
- (7) la fremdultrafiko disdonas senpage la planon de Amsterdam kun Esperanto-teksto.

Tio estas nur komenco. Tiamaniere oni devas daŭrigi la propagandon. Monŝanĝejoj, bankoj, turistoficejoj, atendejoj de tramoj, ŝipoj, pramo, flughaveno, muzeoj, kinejoj, ekspozicijaloj, parkejoj kaj pumpiloj de aŭtomobiloj, preĝejoj, doganejoj, alboardejoj kaj kajoj, krucovoj, en ĉiuj tiuj lokoj venas la eksterlandano, kiu precipe en tiu momento sin sentas perdita. Tial li trovu tie surskribojn kiel ekzemple: *dekstre, malpermesita direkto, necesejo,*

atendejo, malfermita de la 4a ĝis la 6a, restoracio supre, ne fumantoj, akceptejoj malantaŭe en la koridoro, la pramo veturas ĉiun kvaronhoron, diservoj je la 10a kaj la 14a, la prezentado komenciĝas je la 8a, Enirprezo H.fl.0.50, Vestejo, k.t.p.

En ĉiuj grandaj entreprenoj nuntempe oni trovas Esperantistojn. La direkcio certe permesos, ke en la halo pendu karto *Oni parolas Esperanton*. Se eksterlanda Esperantisto venos oni povos venigi la Esperanto-serviston. La sperto montris al mi, ke la plimulto de la homoj havas simpatian por nia lingvo. Laŭ venditaj lernolibroj jam pli ol cent mil homoj en Nederlando interesiĝis efektive pri Esperanto. La interesiĝo ekzistas. Ni zorgu, ke tiu intereso ne malfortiĝu, instigante, ke oni apliku Esperanton en la praktiko per la ĉi supra metodo

Financa Flanko de la Metodo.

Krom la fakto, ke tiu labormaniero multe pli efikas, montriĝis ankaŭ, ke tiu propagando kostas preskaŭ nenion. La kosto por presajoj, la fabrikado de ŝildoj, mencio sur la muro, estas nur unufoja elspezo. Kiom da mono oni elspezis pri luo de iu salono, presajoj, imposto, anoncoj, kaj kompenso al tiuj, kiuj agrablis la propagandvesperon kaj prelegon! Malofte la profito egalvaloras al la malprofito. Oni ne bezonas esti reklamfakulo por kompreni, ke tutjara atentigo multe pli valoras ol unuvespera instigo.

Vizitado ĉe Aŭtoritatuloj.

Mi profitas la okazon por rakonti ankaŭ iom pri tio, kion la praktiko instruis al mi rilate vizitadon ĉe aŭtoritatuloj.

En la komenco mi faris la eraron viziti iun, ne jam petinte konsenton pri interparolo. Malgraŭ tio, oni ofte akceptis min. La kaŭzo de tio estis, ke oni estis iom scivola.

Vizitante la supre nomitajn personojn, nepre memoru, ke:

- (1) la sinjoroj kutime havas tre limigitan tempon,
- (2) pri Esperanto la sinjoroj ĝenerale konas nur la nomon.

Kun rilato al punkto (1) estas tre dezirinde, ke oni anoncu sian viziton jam antaŭe. Tiukaze oni ne alvenas en maloportuna momento kaj certĉe minimume 15 minutoj estos rezervita por vi. Diru tuj la celon de la vizito. Ne diru, "Vi certe aŭdis pri Esperanto. Esperanto estas la internacia helplingvo, aranĝita de D-ro Zamenhof, pola okulisto, kiu siatempe vivis en Varsovio. En sia juneco li rimarkis . . . k.t.p." Tiel la homoj fariĝas malpaciencaj. Tiel oni riskas, ke oni interrompu per, "Tio, kion vi rakontas estas interesa, sed

kial fakte vi venis ĉe mi?" Tial, prefere komencu, "Mi venis por peti, ĉu vi povos permesi, ke ĉi tiu karto pendu en la halo." Tio fakte estas la celo.

Rilate punkton (2), neniu volonte konfesas sian nescion. Sendu jam antaŭe flugfoliojn pri la plej gravaj faktoj pri Esperanto—konstruo, celo, disvastigo. Tiel vi evitas tempoperdon dum la interparolo.

Ofte montriĝis, ke mi ne parolas al tiu kiu rajtas fari decidon. Ofte la *granda potenculo* restas ĉe la unua renkonto *post la hulisoj*. Tion mi devas scii. Se mia gastiganto efektive estas anstataŭanto, mi petas esti prezentata al la direktoro mem.

Nur ĉe oportuna momento oni malfermu sian aktujon por montri la broŝurojn de ĵojroj, turist-entreprenoj, ŝipkompanioj, presejoj, radio-stacioj kaj mondfamaj industriistoj, do pure komercan materialon. Atentigu pri la decido de la Union Postale Universelle, kiu akceptis Esperanton kiel vivantan lingvon; la oficiala rekono de la poŝta servo en Nederlando; la fakto, ke Esperanto estas instruata en alternejoj; la fakto ke registara reprezentanto subskribas ankaŭ la diplomon por instrukapableco, k.t.p.

La Porĉisto.

Ĉu vi permesas doni valoran konsilon? Sin turnante propagandecle al iu entreprenon aŭ potenculo, oni ne pripensu la pordiston nur la viro, kiu staras ĉe la pordo. Li estas la konfidito de la plej altranga funkciulo de la plej granda institucio. Ankaŭ vi konfidu lin. Petu lin, "Ĉu vi bonvolos helpi min?" kaj vi spertus kiom precize li konsilos al vi; ne turnu vin al tiu S-ro B. Tiu ne estas taŭga persono por tio; vi interrilatu kun S-ro K., sed ĉi tiu ne estas en la oficejo hodiaŭ. Li veturis al eksterlando kaj ne revenos antaŭ la unua de la nuna monato. Plej bone estos se vi kontaktos kun tiu, aŭ tiu . . .

La plej gravajn informojn mi ricevis plej afable de la pordisto. Tial mi konsilas, petu lian konsilon.

Per tiu priskribo mi esperas difekti la energion propagandan de la samideanaro sur la ĝustan vojon, al tereno kie klopodado ja repagos milfoje la tempon dediĉitan.

Hans Bakker, Nederlando

Senkulpigo

Sendube niaj legantoj rimarkis iajn ŝanĝojn en la formo de nia Aŭgusta numero, precipe la mankon de la Enigma Konkurso kaj fotografajoj.

Ni deziras klarigi, ke la tuta materialo por tiu numero perdiĝis en la poŝto survoje al la presisto, kaj ni devis lastmomente repetigi la numeron laŭ nia povo. Ni petas vian indulgon tiurilate.

HONGKONGO

Post nur mallonga vigla vivo, la nove starigita Esperanto-Asocio ĉi tie likvidiĝis la tagon antaŭ la atako de la Japanoj. Por malhelpi eventualan malfeliĉon, ni bruligis ĉiujn dokumentojn kaj librojn. Post la eniro de la Japanaj soldatoj ni ĉesigis regulajn kunvenojn kaj unu post alia niaj membroj forfuĝis el iliaj manoj. Tiel la Esperanto-movado ĉi tie tute haltis. La gvidintoj disiris kaj la sorto de multaj restas ankoraŭ enigma. Izoluloj tamen rekomencas la laboron.

Kilu, Hong-Kong

Korespondturniroj de Ŝako

En nia maja numero ni antaŭanoncis pri korespondturniroj de Esperantist-ŝakistoj. La unuaj tri turniroj jam komenciĝis la 1an de Aŭgusto. En ĉiu grupo ludas 7 ŝakistoj el 6-7 landoj. Entute do, partoprenas 21 ŝakistoj el 9 landoj. Aliaj grupoj sekvos tuj kiam aliĝos sufiĉe da partoprenantoj.

D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo

Solena Investo de Kopta Patriarko de Egiptujo kaj Etiopio

La Kristanismo eniris Egiptujon en la unua jarcento pere de Sankta Marko, kiu estis la unua Apostolo de la Kopta Preĝejo en tiu lando. La nuna Patriarko estas la 115a Apŝtolo post Kristo. La solena investado okazis 26an de Majo kaj tio estis okazo por granda, naciampleksa festo kaj manifestacio flanke de la ŝtato, la eklezio kaj la popolo. La ceremonion partoprenis pli ol du mil homoj kaj la radio disaŭdigis la 3-horan solenon.

La nova Patriarko—Yusab 2a (Jozefo)—havas 63 jarojn kaj edukiĝis en Universitato Ateno.

En Egiptujo la Koptoj nombras 1500000 kaj estas idoj de la antikvaj Egiptoj.

La fotografajoj montras la Patriarkon (kiam li estis Episkopo) okaze de vizito al IEL Delegito, S-ro Nasif Mahrus (meze stare) en Fayum.

N.M., Egiptujo



TENDENCOJ ĈE LINGVOJ INTERNACIAJ

Laŭ la feliĉa indiko de Prof. O. Jespersen, *la plej bona internacia lingvo estas tiu, kiu estas la plej facile akirebla por la plejmulto de la homoj.*

Multaj projektoj aperis de 1178 ĝis la hodiaŭa tago, precipe ek de la Renesanca periodo, kaj mi konstatis, ke ĉiuj estas prezentitaj de kleruloj, sed neniu, ĝenerale, sekvitita de la popolamaso.

Filozofoj, sciencistoj, filologoj, multaj el ili famaj en diversaj altkulturaj branĉoj, revis, laboris, pridiskutis kaj vortjonglis en ĉi tiu lingva problemo, sed neniam vekis la intereson de la popoloj, de la *plejmulto*, kiu estas la precipa interesato en la afero.

Lumo ekestis nur en la jaro 1887, post la falo de Volapük kaj apero de Esperanto, kiam ĉi tiu lasta, kontraŭstarante antagonismon kaj skeptikismon, iom post iom eniris en la koron de la popolo. Trimonata trastudado de la ĉefaj historiaj verkoj pri lingvo internacia donis al mi la nepran konvinkon, ke Esperanto estas la taŭga solvo de la problemo.

La jaro 1887 estis kurioza, ĉar ĝi sensofisme dupartigas la tutan tempon de la priartlingva studado je du tute malsamaj periodoj. Detala ekzameno de la sistemoj kaj komparo de epokoj kondukas nin al la sekvantaj konkludoj:

Unua periodo (1178 ĝis 1887)

Projektoj—		
Filozofiaj	14%	
Pasigrafiaj	18%	
Bazitaj sur naciaj lingvoj kaj latina	2%	
Diversaj	6%	

ESPERANTO 1887 KAJ POSTE

Projektoj—		
Filozofiaj	2%	
Pasigrafiaj	4%	
Bazitaj sur naciaj lingvoj kaj latina	25%	
Diversaj	7%	
Bazitaj sur Esperanto	22%	

La procentoj finas hezitojn, diskutojn, klanojn, kaj aksiome montras al ĉiuj la sekvendan vojon.

Multaj aŭtoroj, post multjara prilaborado, kredis efika sian eltrovon kaj ĝin prezentis al la publiko, sed baldaŭ ili mem konstatis ĝian fiaskon kaj sin ĵetis en la modifon de sia verko aŭ en la preparon de nova lingvo. Per palpoj en la mallumo, asertoj senprudentaj, decidoj tro kuraĝaj, hodiaŭ mirindaj morgaŭ fuŝaj, multaj iĝis verkintoj de kvar-kvin sistemoj kaj pasigis sian tutan vivon munte malmunte sen sukceso doni al la homaro la deziratan solvon.

Ĉu mallaŭda kritiko? Tute ne, nur laŭdema konstato. Ni devas esti dankaj al ĉiuj pro tiom da klopodoj, ĉar ĉu ne ili atingis la necesan rezultaton? Ĉiu alportis taŭgan brikon al la fundamento de Esperanto. Ĉiuj laborintoj preparis en la unua periodo erojn, elementojn por la studo poste farita de Zamenhof. Siavice, ĉiu el la dua periodo montris, per reala pruvo, ke Esperanto kia ĝi estas, kun tia Fundamento kaj tia Interna Ideo, estas kaj estos por ĉiam la helpa lingvo de longe ambiciita.

S. Carreira, Portugalujo

LA LEGANTO PAROLAS

La ĉefartikolo en la Maja numero—*Nia Lingvo*—estas tre aktuala. Bedaŭrinde la nivelo de Esperanta ĝusteco ĉe la ordinara samideano estas malalta; kaj eĉ ĉe tiuj kiuj kuraĝas presigi verkojn, troviĝas gramatikaj eraroj kaj neologismoj. Oni legu la recenzojn en E.I. kaj oni devos konfesi, ke Kabe estis prava kiam li konsilis *Unue la Esperantistoj devas lerni Esperanton!* Kiom malofte oni legas, *Lingve kaj stile ĉi tiu verko estas modela!*

Sed ŝajnas al mi, ke kun escepto de la *Fundamento* ni havas nek oficialan gramatikon nek oficialan vortaron por gvidi nin. Estas konsentite, ke *Fundamenta Gramatiko* kaj *Universala Vortaro* estas treege valoraj, sed ĉu ili sufiĉas? Ĉu ne ekzistas bezono por pli ampleksaj plenaj gramatiko kaj vortaro oficialaj al kiuj oni povus sin turni kun la scio, ke tie oni ne trovos ion eraran?

Laŭ mia opinio estus bone, ke la Lingva Komitato (aŭ la Akademio) akceptu respondecon pri oficiala eldono (aŭ rekomendo) de sufiĉe plenaj gramatiko kaj vortaro. Tiuokaze ni havus la evangelion laŭ Zamenhof kaj ne laŭ la bontrovo de iu ajn, kiu povas dungi presiston.

R. Paul, Skotlando

Ni Ordigu Nian Doman: Nia domo estas nia Esperanta lingvo kaj nia tutmonda interparolado. Ĉiu volonte ordigus la komunan domon laŭ siaj propraj inklinoj. Unu interesiga pri literaturo, alia pri scienco, alia pri vojaĝoj k.t.p. En tia afero ĉiu devas pensi al la aliaj, al ĉiuj . . . Gazetoj devas enteni iom da ĉiu interesa rubriko por ke ĉiu leganto trovu en ili la plejmulton da agrabla legaĵo kaj akiru la plej eble kompetentan praktikan scipovon pri Esperanto.

M. Buchet, Francujo

ENIGMA KONKURSO N-ro 7

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj el Konkurso N-ro 5

N-ro 13: Horizontale: komisaro, retoriko, baleno, mamono, dilemo, tero, anatomio, rara, paso, pare, opera, atomo, formato, silogismo, deklamado, allogis, rodulo, cinamo, movi, teo, naso, akademio, tamen, kopii, kakao, pelito, religio, papilio.

Vertikale: kolero, mino, romana, renomi, ridi, kolera, baterio, motoristo, aso, opa, paralogismo, reformacio, pesilo, amoro, modelo, madona, almanako, ducentdeka, monumento, via, teo, sopire, kakao, miopa, talio, ili, peli.

N-ro 14: Ĉiam portu la verdan stelon. Slosilvortoj: falĉilo, genisto, borakso, bramano, karpeno, rotondo, floreno, kartavi, impulso, dorloti, selakto, servuto, arĝento, dekreto, ferdeko, falango, tekniko, brasiko, kuluro, torento, diplomo, risorto, spinaco.

Por ĉiu korekta solvo mi donis kiel kutime 5 poentojn.

Ĝis nun atingis min solvoj de 74 personoj. El Nederlando 19, Britujo 17, Belgujo 8, Francujo 8, Danujo 6, Finnlando 5, Svisujo 2, Italujo 2, kaj po 1 el Hispanujo, Portugalujo, Bulgarujo, Islando, Aŭstralio, Polujo, kaj Brazilo (kie restas Norvegujo kaj Svedujo, el kiuj landoj antaŭ la milito tiom multaj solvis la enigmojn?) Inkluzive de la hodiaŭ publikigitaj enigmoj ĝis nun ĉiuj estis diferencaj. Tion mi kompreneble ne ĉiam povos daŭrigi. Tial mi volus scii la opinion de la solvintoj pri la diversaj specoj de enigmo, por ke mi kiel eble plej multe povu kontentigi la deziron de la plimulto.

Gajnis la unuajn premiojn: F-ino W. M. Millenaar (45 p.) Nederlando, S-ro L. Staal (45 p.) Nederlando, S-ro L. P. Flenz (44½ p.) Nederlando. Al ĉiuj tri mi sendis libroliston, el kiu ili mem povos elekti sian premion (ĉiuj estas bele binditaj libroj). Post ili sekvas: S-ro Dinwoodie (Brit.), S-ro Hasper (Ned.), S-ro Jörgensen (Dan.), S-ro Roelofs (Ned.), S-ro v. Thiel (Ned.), ĉiuj kun 44 p.; S-ro Roelofsen (Ned.) kaj S-ro Robson (Brit.) 43½ p.; S-ro v.d.Broek (Ned.) 43 p.; S-ro Paeleman (Belg.), S-ro Thomassen (Dan.), S-ro Westergaard (Dan.) ĉiuj kun 42½ p.

Enigmo N-ro 17: El unu faru du.

- | | |
|--------------|---------------|
| 1. akvoforto | 6. regimento |
| 2. protokolo | 7. federacio |
| 3. bataliono | 8. brilianto |
| 4. sinoptika | 9. cerefolio |
| 5. kuracisto | 10. apostrofo |

- | | |
|---------------|---------------|
| 11. barometro | 24. malsatego |
| 12. aeroplano | 25. bergamoto |
| 13. kalendro | 26. astrologo |
| 14. monvaloro | 27. punlaboro |
| 15. elokventa | 28. sendolora |
| 16. akuzativo | 29. demokrato |
| 17. inkognita | 30. komandoro |
| 18. longitudo | 31. anarkismo |
| 19. bonfaradi | 32. monogramo |
| 20. kokleario | 33. ampolingo |
| 21. sakristio | 34. kalendulo |
| 22. burokrato | 35. kameleono |
| 23. strategio | |

Per la literoj de ĉiu el la supraj naŭliteraj vortoj oni povas formi du aliajn vortojn, unu kvarliteran kaj unu kvinliteran. La kvarliteraj vortoj ĉiam devas esti substantivoj, kaj la komencliteroj de tiuj vortoj formas en la sama vicordo konatan esprimon.

La kvinliteraj vortoj havas la jenajn signifojn: 1. speco de havena ponto, kiu elstaras la kajon; 2. manĝebla riverfiŝo el familio de karpoj; 3. forpuŝi la polvon per speciala ilo; 4. subite preni ion per rapida movo; 5. ŝmirpentri muron per miksaĵo de kalko kaj sablo; 6. movate tien kaj reen per sinsekvaj skutoj; 7. inspiranta piajn sentojn; 8. aŭdigi rapidan ripetadon de du sonoj; 9. liber-tempo; 10. oni faras el ĝi panon; 11. riverfiŝo; 12. kudrilego; 13. eligante akran bruon de skrapado; 14. unua formo de insekto post ĝia eloviĝo; 15. malmodeste; 16. malpli larĝa ol ortangulo; 17. eligi voĉmodulitajn vortojn; 18. interkonsento kun laboristo por akiri lian servadon; 19. fluecigi per varmo; 20. vironomo; 21. forigi herbaĉojn el kulturitabedo; 22. nigra substanco uzata por hejti; 23. fari esprimman movon de kapo, brako; 24. malraspa; 25. pezunuo; 26. vizitanto; 27. konsumiĝo per fajro; 28. disko el vitro; 29. plej grasa parto el la lakto; 30. malesto de tio, kio estas bezonata; 31. kaŝi la vizaĝon por fariĝi nerekoncbla; 32. fabela malgranda estaĵo; 33. lumigilo; 34. en iu tago de la semajno; 35. malabunde.

5 poentoj.

Enigmo N-ro 18. El du faru unu.

Jen 35 paroj da vortoj, el kiuj la unuaj estas donitaj en la ĝusta sinsekvo, la duaj en alfabeto sinsekvo. Intermetante kunligan literon inter ĉiun vorton el la unua kolono kaj unu vorton el la dua kolono, vi povas formi novajn vortojn. La kunligaj

literoj en la sinsekvo de la vortoj el la unua kolono formas konatan esprimon.

1.	aristo	-	akcio
2.	dek	-	akso
3.	stampi	-	alo
4.	melo	-	alo
5.	kapo	-	aro
6.	dek	-	ĉelo
7.	violo	-	do
8.	mem	-	elo
9.	bo	-	emo
10.	per	-	ento
11.	re	-	esenco
12.	miri	-	estanto
13.	herbo	-	flanke
14.	pro	-	gravuristo
15.	po	-	io
16.	per	-	la
17.	aero	-	lano
18.	peri	-	lito
19.	pro	-	litro
20.	ne	-	metro
21.	pro	-	metro
22.	re	-	nomo
23.	super	-	oni
24.	aparta	-	publiko
25.	po	-	racio
26.	kara	-	rando
27.	ol	-	ranga
28.	pia	-	rasti
29.	kvin	-	rato
30.	unu	-	stilo
31.	re	-	tero
32.	dis	-	tiko
33.	ek	-	tro
34.	kvar	-	ujo
35.	mi	-	urso

5 poentoj.

GRUPOJ KAJ LA KONGRESO

Jam nun ni scias, ke en 1947 okazos la unua postmilita Universala Kongreso, la 32-a, en Bern. Ĉu multaj Esperantistoj partoprenos? Ĉu la kongreso estos pruvo, ke Esperanto estas ankaŭ io alia krom lingvo kun 16 reguloj? La respondo dependas sole de ni, de nia bona volo, de nia komuna inklino al kunlaboro kaj interhelpo.

Entuziasmiĝi kaj instigi Esperantiston iri al kongreso estas superflua. Ĉiu verdulo, ion eksciiginte pri niaj kongresoj, arde deziras partopreni ilin. Tamen la plimulto de Esperantistoj jam estas preskaŭ konvinkita pri tio, ke ili neniam partoprenos... Por kelkaj el ili la sola ebleco estos okazigo de kongreso en ilia lando. Kial tio estas? Pro la simpla fakto, ke oni ne disponas pri la necesaj monrimedoj. Dekmiloj da ni,

sole pro financa stato, estas devigataj forrestri. Ĉu tio estas tolerebla? Ne. Male, tion ni ŝangu!

Ni faras proponon, per kiu ni atingos ne nur, ke niaj kongresoj estu brila sukceso, sed samtempe, ke povu partopreni tre multaj samideanoj, kiuj alie ne povus tion fari, ke al la tuta movado—grupa, landa kaj internacia—estu donata forta instigo al laboro.

Jen la simpla propono:

Ĉiu Esperanto-grupo fondu specialan kason. Ni nomu ĝin *Kongres-kaso*. Ĉiu aliĝinto kontribuu ĉiusemajne tiom, ke post unu jaro la sumo de la kolektita mono estos sufiĉa por ebligi, ke almenaŭ unu membro de la grupo povu partopreni la kongreson.

Necesas starigi regulojn pri la afero, kiuj klarigos la kondiĉojn. Jen klarigaj notoj kaj sugestoj:

- (1) Aliĝi al la Kongres-kaso rajtas nur Esperantistoj, aliĝintaj al iu landa aŭ internacia asocio.
- (2) Ne nur lokaj, sed ankaŭ najbaraj, izolitaj Esperantistoj povu aliĝi.
- (3) La semajna kontribuo estu tiel malalta, ke por neniu ĝi estu tro granda ofero.
- (4) La Kongres-kaso akceptas donacojn.
- (5) Elektro de Kongresonto okazu per lotumo en kiu partoprenu nur ĉiu Esperantisto, kiu pagis kongreskotizojn al la kaso dum la tuta jaro.
- (6) La Kongres-kaso neniom repagas al eksciĝintoj.
- (7) La bonaŭca membro devas uzi la monon nur por viziti la Kongreson.
- (8) Tiu, kiu ne povas iri Kongreson, devas redoni la monon kaj estu kompensata per ia premio (ekz. libro, aŭ jarabono al gazeto).
- (9) En okazo, ke la elektito ne povas iri, dua membro elektigu por partopreni la kongreson.
- (10) Estas atendate, ke ĉiu kiu ne nepre bezonas la monon (povante mem pagi siajn elspezojn), rezignos pri ĝi (aŭ parte).
- (11) La kongresonto vizitos tiun kongreson, kiun li mem opinias plej konvena.

Laŭbezone oni povos aldoni plurajn regulojn por esti certa, ke la tuto estos konforma al la deziro de ĉiuj membroj.

En la Nederlanda vilaĝo Zeist ni jam fondis Kongres-kason. Supozeble tiu estas la unua, kaj la iniciatintoj volonte donos konsilojn al la administrantoj de similaj kaso.

P. J. W. Schilperoord, Nederlando

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 185

OFICIALA INFORMILO

7an Aŭgusto, 1946

ALIĜINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

- Argentina Esperanto-Ligo, Castelli 265, Buenos Aires.
 Bulgara Esperantista Asocio, Str. Graf Ignatiev 2-II, Sofia.
 Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, Praha 47.
 Jugoslavia Esperanto-Federacio, Zagreb.
 Maroka Esperanto-Asocio, 5 Rue Savorgnan de Brazza, Casablanca.

NOVA KOMITATANO

S-ro J. Vondroušek, U botan zahrady 31, Brno, Ĉeĥoslovakujo.

NOVA PERANTO

Hispanujo

S-ro F. Rivelles Gimenez, Plaza de Tétuan 40, Castellon de la Plana.

NOVAJ DELEGITOJ

Angolo

- Benguela.** D: P. G. Almeida Lopes, Direcção Provincial de Fazenda. Tel: 105.
Lobito. D: A. José dos Santos Cadima, Porto do Lobito.

Aŭstralio

- Bruce Rock** (Western Australia). D: W. L. Illingworth, P.O.B.49.
Merrylands (N.S.W.). D: A. Towsey, 4 Loftus St. Tel: UW 9762.

Britujo

- Rochester** (Kent). D: J. W. Bateman, 61 Jackson Avenue.
Rye (Sussex). D: Pastro H. M. Jackson, South View, Cadborough Road.

Wrexham. D: G. Bevan, Stanley Villa, Wrexham.

Danujo

Fredericia. FD (Asekuro; turismo); P. H. Holm, Høgevej 9-I.

Francujo

- Bouillargues** (Gard). D: R. Martin, Ecole communale.
Fougères (I. et V.) D: C. Blot, 17 bis Boulevard St. Germain.
Guéret (Creuse). D: O. Baudet, 5 Ave. du Docteur de la Villatte. Tel: 98.
Prades (Pyr. Or.) D: R. Cayrou, 107 Route Nationale.

Hispanujo

Castellon de la Plana. FD (Sociaj aferoj): C. Mestre Descals, Delegación de Trabajo. Tel: 1918 kaj 2102.

Zaragoza. FD (Matematiko): D. González Marín, Hernán Cortés 5.
 FD (Studentaj aferoj): O. de Diego de la Rosa, Baltasar Gracián 12.

Hungarujo

Felsögöd. D: T. Kovács, Jozsef Attila u.16.

Italujo

- Cordenons.** D: F-ino M. Rossi, Cordenons (Udine).
 VD: L. Gaiotti, Cordenons (Udine).
S. Bonifacio. D: L. Martinelli, S. Bonifacio (Verona).
Spinazzola. D: N. Guidone, Via Plebiscito 18.

Jugoslavujo

- Gorjani Dakovština.** FD (Agronomio): T. Gregurek, Rajonska Uprava.
Medvode. D: O. Avsec, Preska 42. Tel: 2.
Rogaška Slatina. D: Martin Tovornik, zdravilišče. Tel: 10.
Slav. Brod. D: L. Radković, Filipovičev trg. 4.
Sušak. D: S-ino C. Bahorić-Rukavina, Grohavičeva 9-III.

Kanariaj Insuloj

La Laguna (Tenerife). D: J. Régulo Pérez, Cabrera Pinto 30.

Maroko

- Casablanca.** FD (Poŝto): C. Rouzoul, 162 Rue Blaise Pascal.
Marrakech. FD (Instruado): B. S. Ohana, 1 Rue de la Kasbah.

Nederlando

- Dordrecht.** VD: J. H. W. Doorneveld, Merwedestraat 163. Tel: 4719.
Harlingen. D: T. Boersma, Voorstraat 30.
Hulst. D: E. J. C. Rademakers, Tivoliweg 21, Hulst (Z.).
Utrecht. FD (Hoteloj kaj Restoracioj): H. van der Mark, Oudenoord 67 bis.
Wolvega. D: S. Halma, Steenwijkerweg 9b. Tel: 100.

Nov-Zelando

- Hamilton.** VD: N. J. Winch, 45 Anglesea St. Tel: 2305.
 FD (Katolikismo): La VD.
Wellington. VD: C. Phillips, 29 Baroda St., Khandallah, N.5.

Palestino

Tel-Aviv. FD (Medicino): D-ro M. Lokshin, Ben Jehuda str. 155.

Polujo

- Lódz.** FD (Studentoj; Skoltismo): A. Pawlowski, Kosciuszki 69-2. Tel: 219-24.
Ozarów. D: D-ro J. Ichnowski, Tarlowska 8, Ozarów powiat Opatowski.
Rychbach. D: S-ino N. Klein, Bielawska 3.

Sud-Afriko

- Cape Town.** FD (Komerco): F. M. Woolf, 2 Oldfield Court, Oldfield Road, Sea Point. Tel: 4.5762.
Durban. FD (Juro kaj Ataŝeaj aferoj): A. dos Santos Matias, Portugala Konsulo.

Svedujo

- Billdal.** FD (Fruktokulturo): E. W. Anjou, Box 217. Tel: 218.
Grums. FD (Komerco): G. Nordling. Tel: 60.
Hamburgsund. D: Oscar Juhlin.
Höganäs. D: A. Johansson, Stormgatan 7. FD (Kontraŭalkoholismo): La D.
Kalmar. FD (Lingvoj; kontraŭalkoholismo): H. Levi, Esplanaden 21. Tel: 1881.
Krylbo. FD (Budhismo; Skoltismo): R. Petri, Järnvägshotellet. Tel: 1550.
Lulea 2. D: E. Lundkvist, Box 206, Svartön.

FD (Fervojoj): La D.

- Malmö.** FD (Radio): S. Claussion, Stensbocksgatan 19 B.
Tungelsta. FD (Roz- kaj krizantemkulturo): Gideon Wolmer. Tel: 110.
Ulricehamn. FD (Instruado): J. Stenström, Sanatorievägen 14. Tel: 709.
Vaggeryd. FD (Akuŝado; flegado): S-ino M. Thoraes, Pl. 200. Tel: 250.

Svisujo

- Lausanne.** FD (Librobindado; gimnastiko): H. Herrmann, Maupas 31, ĉe Rosa.

ŜANĜOJ

Aŭstralio

- Narrogin.** D: vakas.

Britujo

- Llandudno.** D: vakas.
Margate. D: vakas.
Newport (I.O.W.) D: vakas.

Danujo

- Esbjerg.** FD (Asekuro; Turismo): vakas.

Jugoslavujo

- Peranto:** adresŝanĝo: Gradska stedionica, Trg. Republike 10a.
Semeljci. FD (Agronomio): vakas.

Nederlando

- Drachten.** D: adresŝanĝo: Torenstraat 1.

Portugalujo

- Lisboa.** FD (Juro kaj ataŝeaj aferoj): vakas.

Svedujo

- Stockholm.** FD (Arbar- kaj ter-kulturo): nova adreso: Kungl. Skogsstyrelsen, Vasagatan 36. Tel: (Loĝ.) 353360; (Of.) 233660.

Svisujo

- Ettenhausen.** FD (Librobindado; gimnastiko): vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ

244. S-ro A. Bloemendal, Deventer, Nederlando.
 245. S-ro K. Mamrot, Lódz, Polujo.
 246. S-ro B. P. Blöndal, Hvammstanga, Islando.
 247. S-ro G. Bevan, Wrexham, Kimrujo.

DONACOJ por helpi al la forigo de la defecito: "Donaco de Svedo" £5, R. G. Robbins 48. 6p.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo: G. C. Jervis 58., Letchworth Esp. Soc. 30ŝ., N. Wooding £5, F-ino A. B. Holness 58.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO

Ĝen la stato de la membraro je la fino de Julio, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Julio 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	3180	6220
Individuaj Membroj:		
MJ	786	974
MA	1610	3907
MS	122	247
Patronoj	23	24
DM	78	95
HM	14	20
	2633	5267
	5813	11487

Korespondajoj en Julio, 1946:

Ricevitaj	692
Senditaj	725
	1417

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

NASKIĜOJ

Walder—Je la 15a de Julio al Ge-sroj Otto Walder (nia Ĉefdelegito en Svisujo) filino, Monika Elisabeth.

Reville—Je la 15a Aŭgusto al Mary kaj Eric Reville, 24 Welby St., Manchester 13, Anglujo, filineto Heather.

Volas korespondadi kun ĉiuj landoj. Mi garantias respondon. Vlastimil Stenc, Praha-Vysočany, Na Harfě č. 8, Ĉeĥoslovakujo.

Juna teatra aktoro deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Majetic Franjo, Narodno Kazaliste, Varazdin, Jugoslavujo.

Nederlanda filatelisto deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun samideanoj en diversaj landoj. W. J. van Kempen, Justus van Effenstraat 50 bis, Utrecht.

Frisa Esperantista Rondo (Sokr. W. Böttcher, P.C. Hooftstraat 25, Leeuwarden, Nederlando) urĝe serĉas Ĉe-instruiston por diverslokaj kursoj dum la tuta vintra duonjaro.

Kun ĉiuj landoj deziras korespondi niaj grupanoj. Skribu: S-ro Briot, 7 villas Parc, Les Lilas (Seine), Francujo.

Deziras interŝanĝi ilustritajn gazetojn kun ĉiuj landoj, S-ro Carlos Mestre, Delegación del Trabajo, Castellon de la Plana, Hispanujo.

Oficiala makleristo akceptas ĉiuspecajn reprezentadojn en ekskluzivo por Hispanujo. Ekspostistoj skribu al S-ro Joaquin Rambla Sales, Zaragoza 45, Castellon de la Plana, Hispanujo.

Ekspostistoj de peklita gado, se vi deziras havigi al vi bonajn klientojn en Hispanujo, bonvolu skribi al S-ro Federico Rivelles, Plaza de Tetuan 40, Castellon de la Plana, Hispanujo. Ĉiuspecaj reprezentadoj akceptataj.

Esperantisto (kvindekjara) deziras korespondadi pri ĝen. temoj kun seriozaj samidean(in)oj tutmonde, l., pm., pk. S-ro E. P. Cocks, "Denstone", Lindum Avenue, TRENTHAM, Staffs., Anglujo.

Korespondado pri Vivreformo, ankaŭ poŝtmarkŝanĝo, deziras Martin Maschler, Herzlia, Rue Benjamin, Palestino.

Internacia Instituto por Memklerigo, Eldonejo kaj Librejo, Rakovski 108, Sofia, Bulgarujo, interŝanĝas poŝtmarkojn kun tuta mondo; akceptas reprezentadon de libroj kaj librejaj varoj el ĉiuj landoj.

Bulgara samideano deziras korespondi kun junaj, modestaj, bonstaturaj fraŭlinoj el la tuta mondo pri turismo. Respondo garantiata. Skribu al adreso: G. Atanasov, Werila 3, Ŝumen, Bulgarujo.

Tóth Ladislao, 36-jara instruisto, Sardul Nirajului — Székelysárd, jud. Mures, Rumanujo, dez. kor. pri ĉiuj temoj kun seriozaj Esperantistoj el la tuta mondo. Oni skribu ankaŭ al liaj gekursanoj vilaĝaj gejunuloj 14-24 jaraj. Respondas ĉiam.

INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKANTOJ

Jam aperis la unua numero de nia dulingva organo

Universala Poŝtmarka Revuo

Interesa, valora, bonkvalita)

La papermanko ne permesas, ke ni sendu ĝin al ĉiuj Esperantistoj, sed ni volonte sendos specimenon al ĉiu petinto, kontraŭ freŝa poŝtmarko (egalvalora de 6 anglaj pencoj) de via lando.

Membro de IAPK (jarkotizo 5 ang. ŝil.) ricevas la revuon senpage.

Filatelistoj aniĝu nun por ekscii pri nia nova sistemo de interŝanĝado sen pago de mono.

Petu nian Poŝlibreton, riceveblan kontraŭ vialanda poŝtmarko je valoro de alilanda afranko.

Skribu legeble al la Organiza Sekretario, S-ro P. H. Lewis, XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo.

32-α UNIVERSALA

Kongreso de Esperanto, Bern, Svisujo

26a Julio—2a Aŭgusto, 1947

Adreso : 32a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20,
Bern, Svisujo.

ALIGILO

Mi aliĝas al la 32a Universala Kongreso de Esperanto kaj kunsendas
laŭ la subaj detaloj.

Familia nomo (1) S-ro, S-ino, F-ino

Personaj antaŭnomoj (1)

Profesio (2) Nacieco (2)

Urbo aŭ vilaĝo (1)

Provinco (1) Lando (2)

Strato (1) N-ro

194 Subskribo

(1) En nacia lingvo. (2) En Esperanto.

KONGRES-KOTIZOJ

	Ĝis	Ĝis	Poste
1. Kongres-kotizo	31-12-46 sv. fr. 25 aŭ 30/-	31-3-47 sv. fr. 30 35/-	sv. fr. 35 40/-
2. Por la edzo aŭ edzino de kongresano	sv. fr. 12 aŭ 15/-	sv. fr. 15 18/-	sv. fr. 20 24/-
3. Por gejunuloj ne pli ol 20-jaraj	sv. fr. 10 aŭ 12/6	sv. fr. 12 15/-	sv. fr. 15 18/-

Aliĝilojn kaj pagojn oni sendu al la Kongreso laŭ la supra adreso,
aŭ al Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo.

Nomo de la edzo aŭ edzino aliĝinta laŭ la supra informo